

# El fervoja mondo 7/2014

## Aŭstralio: Longdistancaj trajnkursoj el Sidnejo en nova formo

Vojaĝantoj en aŭstralia ŝtato Nova Sud-Kimrio en estonto povos vojaĝi en 65 novaj vagonaroj. Financajn kostojn 2,8 miliardoj da aŭstraliaj dolaroj (ĉirkaŭ 1,85 miliardoj da eŭroj) pagos ŝtata registaro. Kiel anoncis ĉefministro kaj trafikministrino, estas planata aĉeto de vagonoj, kiuj jam troviĝas en merkato. Novaj vagonaroj venos en ekspluatadon en jaroj 2019 ĝis 2024 kaj priservos longdistancajn liniojn, ekzemple inter la urboj Sidnejo, *Newcastle* kaj *Illawarra*. Nuntempaj vagonkombinaĵoj *Oscar* restos ekspluatataj sur antaŭurbaj linioj.

## Ĉeĥio: Cent jaroj post atenco al tronheredonto



Lastan junian sabaton de 2014 pasis 100 jaroj post atenco al tronheredonto de la imperio Aŭstrio-Hungario, Francisko Ferdinando. Okaze de tiu ĉi datreveno en fervoja stacio *Praha-Dejvice* estis ekspoziciata lia salonvagono *AZA 1-0086*. La salonvagono estis konstruata speciale por ĉefduko Francisko Ferdinando en fabrika entrepreno *Ringhoffer* en *Praha-Smíchov*. La tronheredonto uzadis la salonvagonon dum siaj privataj familiaj kaj duonoficialaj vojaĝoj. La unuan fojon li uzis ĝin en aprilo 1910 dum trajnvojaĝo el *Pula* al *Divač*, pli poste dum siaj vojaĝoj ekzemple al Francia Riviero aŭ por vizitoj de germana imperiestro *Wilhelm II*. En la salonvagono li deziris veturi eĉ al Sarajevo en junio 1914. Tamen pro rajpinta radakslagro la ĉefduko devis uzi pasaĝervagonon de 1a unua klaso. En kadro de projekto Granda milito la salonvagono kun vaporlokomotivo 464.102 estis ekspoziciata vendredon, la 27-an de junio 2014 inter 13-a kaj 18-a horoj en fervoja stacio *Praha-Dejvice*. De tie je la 18-a horo la historia trajno forveturis al Ĉefa stacio en urbo *Brno*, kie oni solene bonvenigis ĝin sabate, la 28-an de junio je 15.30 horo. Tie publiko povis trarigardi la salonvagonon inter 16-a ĝis 19-a horoj. Kiel en *Praha*, tiel en *Brno* oni povis aŭskulti rakonton pri atenco en Sarajevo, kiu fariĝis preteksto por komenco de unua mondmilito.

## Ĉeĥio: Foiro *Czech Raildays* kun *railjet* en ĉefa rolo



Jubilea dekkvina foiro de fervoja tekniko *Czech Raildays*, dum kiu regule renkontiĝas faka kaj laika publiko, en jaro 2014 okazis en signo de nova trajnkompleto *ČD railjet*. Tiu ĉi alvenis al foirejo en *Ostrava* propramove kiel laŭordona trajno dimanĉe, la 15-an de junio 2014. Vizitantoj de la foiro krome povis spekti vicon da aliaj eksponaĵoj, inter kiuj ne mankis ekz. dukurenta motorvagonkombinaĵo *RegioPanter* aŭ modernigita aŭstra pasaĝervagono *Bmz*.

Moderna trajnkompleto *railjet*, vice jam la tria liverita de firmao *Siemens*, ne servis nur kiel senmova eksponaĵo, ĉar dum ĝia veturo el *Praha* al *Ostrava* kaj reen povis vojaĝi en ĝi pasaĝeroj sen deviga rezervo.

Krom la menciitan *railjet*, vizitantoj de la foiro povis trarigardi duvagonan elektran kombinaĵon *RegioPanter* serio 650 de kompanio *Škoda Vagonka*, destinitan por suda Moravio, modernigitan pasaĝervagonon duaklasan de serio *Bmz* kaj aliajn veturilojn, inter ili trakesplorveturilon por elektroteknikaj kaj bremsaj trafikekzamenoj *MV 1* de filia kompanio *VÚŽ Praha*, motorvagonon *ETCS 99 9165 001-7* de kompanio *AŽD Praha*, destinitan por ekzamenado de aranĝaĵoj, fabrikataj de la kompanio *AŽD Praha*, kaj aliajn eksponaĵojn.



La unuan tagon de la foiro krom alia okazis solena bapto de nova malgranda mezurad-motordrezino *MDD.1*, fabrikita de kompanio *CZ LOKO* por Administracio de fervojaj relvojoj. La speciala fervoja veturilo estas destinita por mezurado de geometriaj parametroj de reloj en staciaj trakoj. La duradaksa veturilo disponas pri hidrostatika transmisio de povumo kaj povas atingi maksimuman rapidon 75 km/h.

En la jaro 2014 en la foiro prezentiĝis ĉirkaŭ 170 firmaoj, okupiĝantaj ne nur pri propra fabrikado de veturiloj, sed ankaŭ pri diversaj komponantoj, informaj teknologioj aŭ kontraŭvandalaj ŝprucfarbadoj. Mankis nek eksponaĵoj el sfero de urba trafiko, inkluzive de kelkaj elektrobusoj.

Krom propra ekspozicio, en kadro de akompana programo, ekzemple 17-an kaj 18-an de junio okazis dutaga konferenco por faka publiko pri la temo „Konstruo de grandrapida fervoja sistemo en Ĉeĥa respubliko“.

(Foto el ret-parto de *Železničář*)

Merkrede, la 18-an de junio krome okazis faka seminario „Evolutendencoj en teritorio de infrastrukturo kaj relveturiloj 2014“.

### **Ĉinio: *Rapidtransit* – rapida veturilo por urbo**

Fabrika entrepreno *CNR Changchun Railway Vehicles* prezentis prototipon de elektra vagonkombinaĵo *Rapidtransit*. *Rapidtransit* povas fariĝi „rapida fervoja veturilo por interna urbo“ kaj estas destinita por ekspluatado en trafiko, kiu kunligos ĉefajn urbojn kun iliaj kreskantaj antaŭurboj, satelitaj urboj kaj flughavenoj, ideale por trajnkursoj ĝis 100 km. Trajno povas havi tri, ses aŭ naŭ vagonojn, kies vagonkestoj estas fabrikataj el alumina fandaĵo. Laŭ mendo de klientoj eblas garantii maksimuman rapidon 120 ĝis 160 km/h. En la vagonoj ne estas tualetejoj.

### **Kenjo: Por fervoja linio el Najrobio direktos mono el Ĉinio**

Ĉina banko *China Exim Bank* konfirmis, ke ĝi financos 609 km longan linion inter *Mombasa* kaj Najrobio. La investanto garantios 90 procentojn da elspezoj, t. e. ĉirkaŭ 3,6 miliardoj da dolaroj. Restan parton pagos kenja registaro. Ĉefaj konstrulaboroj komenciĝos en oktobro 2014 kaj daŭros 42 monatojn. Livero de veturilaro konsistos el 56 dizelelektraj lokomotivoj, 1620 varvagonoj kaj 40 pasaĝervagonoj. La linio estas konstrue proponita por trajnoj kun ŝarĝlimo 4000 tunoj, por kombinita trafiko per duetaĝaj varvagonoj kaj kun eblo de estonta elektrizado.

### **Nederlando: Kiel aspektos trafiko post 15 jaroj?**

Nederlanda registaro pritraktis kaj aprobis strategion por evoluigo de fervoja reto en venontaj 15 jaroj. La dokumento nomigita *LTSA II* mencias elspezan monsumon 18 miliardoj da eŭroj por bontenado kaj regado de ekzistanta fervojreto, kaj monsumon 10 miliardoj da eŭroj por nova infrastrukturo. Al celoj apartenas plialtigi nombron de personkilometroj sur unuopaj linioj je 4 ĝis 27 procentoj (laŭ stato de jaro 2011). La plej granda kresko okazos en regiono *Randstad*. La raporto ekzemple mencias ekspluati po ses trajnoj EC en horo sur fervojlinio *Amsterdam – Eindhoven* ĝis la jaro 2017.

### **Rusio: Foiro Transrusia denove sukcese okazis**

Jam deknaŭan fojon rusa ĉefurbo Moskvo fariĝis gastiganto de foiro *TransRussia*. En jaro 2014 ĝi okazis en la tagoj 22-an ĝis 25-an de aprilo en internacia foira areo *Crocus Expo*, unu el la plej konataj en Eŭropo.

Malgraŭ komplika situacio en Ukrainio la foiron *TransRussia* partoprenis pli ol 500 ekspoziciantoj el 31 landoj de Eŭropo kaj Azio. Tio estas komprenebla, ĉar tiu ĉi aranĝo prezentas elstaran platformon ne nur por prezento de novaj trafikaj aranĝoj kaj transportistoj, produktaĵoj kaj servoj, sed precipe por faro de bezonataj novaj komercaj kontaktoj, sen kiuj komerco direkte orienton estas preskaŭ nerealigebla. Ekzemple pro

tio grandan parton en la ekspoziciaj salonoj okupis ankaŭ komuna ekspozicio de germanaj firmaoj, transportistoj, havenoj kaj fabrikistoj, al kiuj kompreneble dominis foirtendo de kompanio *DB Schenker*, respektive ĝia filia kompanio *Railion Russia Services*. Tiu ĉi en rusia merkato sukcese agas ekde jaro 1999 kaj organizas krom alian transportojn de agrikultura tekniko el Eŭropo al Meza Azio, inkluzive garantion de gardado de trajno dum tuta vojaĝtempo.

Sian reprezenton ĉi tie havis ankaŭ haveno *Sassnitz-Mukran*, kiu disponas pri parto kun larĝaŝpura trakaro, kaj estas uzata ekzemple en transporto de eksterordinaraj kaj translimprofilaj sendaĵoj, ekspeditaj el Eŭropo al Rusio. Sijajn naciajn ekspoziciaĵojn ĉi tie tamen havis ankaŭ aliaj landoj, kiel ekz. Belgio, Finnlando, Litovio, Ĉinio aŭ Kazaĥio.

Interese kaj moderne efikis prezento de Belorusio, inkluzive de Belorusaj Fervojoj. Ĉi tiu prezentiĝis kiel moderna trafikisto, realiganta larĝan skalon de longdistancaj konteneraj trajnoj, kun vagonoj konstruitaj speciale por bezonataj mezuroj en kunlaboro kun operato *Berlinertrans*. Ekzemplo estas trajnkurso *Viking*, kunliganta ukrainiajn havenojn *Iliĉevsk* kaj *Odesa* kun haveno *Klaipėda* aŭ *Moskovit*, kaj garantianta unufoje en semajno kunligon de germana *Duisburg* kun Moskvo. Distanco 2200 km estas traŭrata en kvar tagoj kaj duono.

Rusaj Fervojoj propagandis eŭroazian kunligon sur trakoj. Kompreneble estas bezonata mencii ekspozicion de Rusaj Fervojoj (*RŽD*), dominanta salonon 3, celita por propagandi eŭroazian fervojan kunligon. Ĝia evoluo, inkluzive modernigo de Transsiberia kaj Bajkal-Amura magistraloj, estas ankritaj en ŝtata trafika politiko de Rusio ĝis jaro 2030. En la jaro 2009 ĝi estis prilaborata kaj aprobita programo pri evoluigo de konteneraj transportoj en direkto oriento-okcidento ĝis la jaro 2015. Agorde kun tiu ĉi programo nun estas proponata flanke de *RŽD* produkto *Transsib* en 7 tagoj, kiu celas alporti signifan kreskon de fervojaj transportoj. La produkto povas fariĝi interesa transportsolvo inter Eŭropo kaj Malproksima Oriento, ekz. al Ĉinio aŭ Koreio.

### **Parto de la foiro estis ankaŭ akompana programo.**

Multnombre en la foiro estis prezentataj ankaŭ kompanioj ekspluatantaj havenojn preskaŭ en la tuta mondo. Parton de ekspoziciantoj prezentis ankaŭ fabrikistoj de larĝaŝpuraj varvagonoj kaj lokomotivoj, kiuj por oferti siajn produktojn pli vaste uzis foiron *Expo 1520*, okazanta ĉiun duan jaron en *Ŝĉerbinka* apud Moskvo.

Sian prezenton en la foiro havis ankaŭ entrepreno *IT* kaj mediaj kompanioj. Interesajn kaj utilajn informojn eblis ricevi en stando de kompanio *Promyšlenie Gruzy*, kie al dispono estis mapoj kun ŝarĝofluoj de diversaj komercaĵoj.

Riĉa estis ankaŭ akompana programo, konsistanta el kelkaj fakaj konferencoj kaj el vico da diskutforumoj, el kiuj eble plej interesa fariĝis diskuto kun *Genadij Bessonov*, ĝenerala sekretario de Kunordiga konsilio de Transsiberiaj transportoj, pri temo Evoluigo de konteneraj transportoj sur fervojo en direkto okcidento – oriento – okcidento.

Multaj demandoj en la diskutforumo celis problemaron pri fabrikado de fervojaj veturiloj en Ĉeĥio. Ĉeĥaj lokomotivoj ja havas en Rusio konstante bonan akcepton. Standon de Ĉeĥa ambasadorejo *ČD Cargo* vizitis krom alia reprezentantoj de Ĉeĥa ambasadorejo en Moskvo, kiuj informis pri aktuala situacio en preparo de konstruo de larĝaŝpura fervojlinio el *Haniska* apud *Košice* al Vieno.

Interkonsentita krome estis kunlaboro de *ČD Cargo* kun produktaj kaj komercaj kompanioj en Rusio. Orientaj merkatoj ja estas daŭre supozataj inter tiuj plej perspektivaj, ja estas bone, ke ankaŭ *ČD Cargo* havis eblon prezenti siajn servojn en la foiro Transsiberia, kiu per sia signifo estas komparebla kun sia munkena kolego.

Sur aĵdonitaj fotoj:



Gastojn de la foiro bonvenigis *Vadim Morozov*, unua vicprezidanto de *RŽD*, kiu konfirmis intereson pri kunlaboro en transportoj sur Transsiberia magistralo.



Ankaŭ stando de *ČD Cargo* altiris atenton de vizitantoj.

### **Usono: Fervojlinio *SunRail* helpas al loĝantoj de Orlando**

Antaŭurba fervojlinio *SunRail*, priservanta urbon *Orlando*, estis malfermita por ekspluatado en ŝanĝtempo de aprilo kaj majo 2014. Kvindek kilometrojn longa linio trairas 12 staciojn, kaj ĝia konstruado komenciĝis en januaro 2012. Konstrukostojn taksitajn je 357,2 milionoj da dolaroj duone pagis federacia registaro, restantaj elspezoj estis egale dividitaj inter ŝtato kaj lokaj oficoj. Firmao *MotivePower* liveris sep dizelektrajn lokomotivojn kaj firmao *Bombardier* 20 duetaĝajn pasaĝervagonojn. Trajnoj ĉi tie trafikis en duhora kadenco, en trafikmaksimumo eĉ en tridekminuta.

Laŭ *Železničář* kaj *Cargovák*

preparis *Jindřich Tomášek*,  
reviziis *Heinz Hoffmann*